Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo) エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Seminario en Jacugatake farita

Namba Fumiharu

Je la 28-29a de junio (sabato kaj dimanĉo), nia organizo Esperanto Jokohama okazigis seminarion en Esperanto-Domo de Jacugatake, kiu situas ĉ. 100 kilometrojn nordokcidente de Jokohamo. Kvin rondanoj partoprenis en tiu seminario.

Por la vespermanĝo, ni havis tempon “Nur-Esperanta Kuirado”. Dum la kuirado, ekde kiam ni iras al aĉetado, kaj ĝis la “Bonan apetiton!” ni uzu nur Esperanton. Ni faris japanstilan “kareaĵon kun rizo”, kaj salaton. Por la kareaĵo, mi (Namba) kunportis cervaĵon kiun mi aĉetis en monta vilaĝo Tooyama-go（遠山郷）. Tial la kareaĵo fariĝis “cervo-kareo” kun iomete unika gusto.

En la dimanĉo, post la matenmanĝo el pano kaj salato, ni (krom unu frua foririnto) ekskursetis al akvofaloj *Doryuu-no-taki*（吐竜の滝）, kaj je la tagmezo ni finis la seminarion ĉe stacidomo Kobuchizawa.

Okazos

En la 7a de septembro, de la 14a horo ĉe la Muzeo okazos **“Prezento de Spertoj”**, en kiu niaj membroj parolos Esperante pri sia sperto en tiu ĉi jaro.

Esperanto Jokohama

■ Eldonas NPO Esperanto Jokohama ■ Redaktas : Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Adreso: Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si,
Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)
■ Redaktejo: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp ■ TTT-ejo: http://www.esperanto.yokohama/
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-i (Jokohama Esperanto-Rondo)

La 135-a Legokunsido

En la 6a de junio okazis la 135-a Legokunsido. Partoprenis 5 personoj, kaj ĉiu parolis pri sia libro lastatempe legita.

Grandioza tavolo de epokoj kaj roluloj — “La granda kaldrono” de John Francis

Mizro Iwaya

Tiu ĉi libro estas grandioza. Ĝi havas 600 paĝojn papere. Laŭ mia memoro ĝi estas la plej granda libro verkita originale en Esperanto. Do mi elektis ĝin por nia legokunsido, ĉar ĝi estas tre granda kaj supozeble neniu el ni, hamarondanoj, legis, nek legos ĝin. Ĉu mia peno estis rekompencita? (Mi legis la libron en bitformo. Ĝi estas pli malmultekosta kaj oportuna por enmanigo.)

La libro estas grandioza, ĉar ĝi montras kvar ĉefajn protagonistojn en du malsamaj epokoj. Ili estas:

Dunkan Maclean: laboristo en Glasgovo kaj poste soldato en la unua mondomilito

Ina Maclean: Fratino de Dunkan, laboristino en Londono, kaj poste edzino de Georgo Gill; s-ino Gill

Donaldo Maclean: Kuzo de Dunkan kaj konscienca rifuzanto de soldatservo en la unua mondomilito.

Jano: Filo de ges-roj Gill, piloto de la aerarmeo en la dua mondomilito

Kompreneble aperas multaj aliaj flankroluroj, kiuj buntigas la tutan historion.

Kiam mi legis alian longan verkon, “Kiel akvo de l’ rivero”, mi trovis ke ĝi estas sufiĉe facile legebla kvankam la tuta historio estis tre longa, sume 500 paĝoj. Kompreneble tio estas sur la kondiĉo, se mi dediĉas sufiĉe da energio por ĝi. Ĝia historio estas simpla fluo “de pasinteco al futuro.” Sed kun la temata libro, la tempo saltas de la unua mondomilito al la dua mondomilito poste refoje al la unua, kun iu rolulo al alia, poste aliaj, kvazaŭ mi legus kelkajn librojn paralele. Ili aperas sen klarigo, tial mi ofte stagnis dum legado divenante, kio estas la rilato inter tiuj kaj aliaj roluloj. Ĝi klariĝis nur post ĉirkaŭ 100 paĝoj. Tia stagno konsumis mian energion. Ĉu tia estas la intencita intrigo de la aŭtoro?

La ĉefa temo de la libro estas milito. Tio evidentiĝas ĉar temata epoko estas du grandaj militoj ĉirkaŭ Britio, aŭ Skotlando. La sinteno de la aŭtoro estas kontraŭ militoj, ĉar Donaldo estas konscienca rifuzanto de soldatservo. Lia batalo kontraŭ la aŭtoritato estis detale priskribita en la libro. Krome aperas Ĝon Maclean, aktuale ekzistinta socialisto-kontraŭmilitisto en Skotlando. Certe la aŭtoro estas lia simpatianto .

Mi vidas ke la aŭtoro detale priskribas la okazaĵojn ĉirkaŭ Glasgovo. Tial mi povas trovi diversajn interesaĵojn okazintajn ĉirkaŭ tiu urbo. Mi povas diri ke la tuta verko estas detala kroniko de Glasgovo. Se vi havas tian intereson, vi povas elekti tiun libron kaj bone studi ĝin.

Dunkan mortis en la milito. Sed aliaj vivis plu. La aŭtoro montris nur la sinsekvon de la aferoj sen klara rezulto, nek protesto. Homoj vivis kaj batalis. Ili ofte mortis sensence. Tia estas ripeto de homa historio. Tiamaniere venis fino de la verko.

Laste mi volas montri al vi, kio estas la granda kaldrono. Ĝi estas grandioza tavolo de miksaĵo pri ĉiuj aferoj en la mondo, kiu aperas en Makbeto. Sorĉistinoj tie kuiris strangan miksaĵon en granda kaldrono. Tia estas la koncepto de la mondo laŭ la aŭtoro, mi supozas.

“Kwaidan/Fantomrakontoj” esperantigita de IĈIMURA Ŝiroo

Sibayama Zyun’iti

Lafcadio Hearn, japannome Koizumi Jakumo, estis naskita en 1850 en Greklando, finis vivon en 1904 en Japanio. Junaĝe li kreskis en Irlando, kaj poste vivtenis sin en Usono kiel ĵurnalisto. Veninte en Japanion en 1890, li loĝis en Macue kaj edziĝis kun Koizumi Secu. Aŭskultinte el Secu japanajn legendojn, en kiuj ofte aperas fantomoj, Hearn verkis en la angla tiujn rakontojn kaj eldonis kiel “Kwaidan”, kun 17 rakontoj.

El ili, 9 rakontoj estis tradukitaj Esperanten de Iĉimura Ŝiroo (1929-2020), kaj eldonita de lia propra kosto en 1995, kiel “Fantomrakontoj”. Li estis instruisto de la japana lingvo, kaj li poste eldonis, ankaŭ siakoste, rakontaron de Akutagawa Rjuunosuke nomata “Tabako kaj Diablo”.

El la tradukoj de “Fantomrakontoj”, la plej famaj al ni kredeble estas la rakontoj “Hoiĉi-Senorela” kaj “Muĝina”. Mi pensas ke, multaj japanoj konas tiujn rakontojn dank’ al la rerakontoj de Lafcadio Hearn.

Nu, la rakonta maniero de Lafcadio Hearn en la angla estas multa uzado de punktokomoj (;), kaj daŭrigo al la sekva rakontero. Ekzemple, en “Osidori / Mandaren-anasoj”,

“So he went to Akanuma; and there, when he came to the river-bank, …”,

la tradukita esperantaĵo estis jena, kopiante la strukturon de la originalo.

“Tial li iris al Akanuma; kaj tie, kiam li venis al la riverbordo, …”

Unu el ties tradukita japanaĵo estis :

「そこで彼は赤沼へ行った。岸についた時、・・・」

do en 2 apartaj frazoj,

kaj la alia traduko estis :

「そうして赤沼のあの場所の川岸へ行くと、」,

do en 1 frazero sen ia ajn apartigilo kiel komo.

Tiel, la rakonta stilo el la originala angla restas en la traduko en Esperanto.

Nu, la felietona televida serio de NHK en aŭtuno 2025, laŭ antaŭanonco, estos “Bake-bake”, fikcio laŭ la vivo de Koizumi Secu kaj Lafcadio Hearn. Tial mi proponis al la Eldona Fako de JEI aperigi tiun “Fantomrakontoj” en Esperanta traduko, kun plenaj 17 rakontoj. Mi jam tradukis 4 el ili, kiujn mi ja prezentis en la lernohoroj de “Jokohama Salono”, kaj nun tradukas 1, kaj espereble tradukos pliajn 3, por esti en la proponata libro.

Por fari la eldonon, la unua afero estis akiri permeson reuzi la tradukon de Iĉimura. Feliĉe liaj gefiloj nun loĝas en la sama adreso de la bedaŭrata sinjoro, kaj proksime loĝanta JEI-ano vizitis tiun domon kaj sukcesis kontakti la kopirajto-posedanton, kiu bonkore permesis la represadon.

Kiel alia afero por la eldono, oni devas tekstigi la tradukon de Iĉimura. Por tio, pruntedonis la Esperanto-Muzeo Jokohama la ekzempleron en sia stoko. Oni permesis eĉ tranĉe malbindi la paĝojn por esti skanata de Optika Liter-Legilo. Kaj feliĉe unu el la membroj de la Eldona Fako sukcesis tekstigi la libron sen malbindi la libron. Mi kontrolis la tekston, kaj trovis, ke la plejofta eraro estis, ke [ĝ] fariĝis simpla [g], sed multaj [ĝ]-oj estas trafe legitaj. La uzo de tiu komputila programo estas utila, mi opinias.

eĥo el Aŭstralio

Koran dankon pro la sendado de tiu numero de Novaĵoj Tamtamas. Surprizis min ke sinjoro Doi Ĉieko instruas tiom da kursoj. Gratulon al li.

Franciska Toubale

[el la Redaktanto] *Dankon al Franciska pri nia n-ro 408 (junio), tamen notu, ke temas pri SINJORINO Doi Ĉieko. Ŝia edzo, SINJORO Doi Hirokaz instruas en alia klaso. La gesinjoroj estas la motoro de nia Esperanto-Muzeo Jokohama.*

ges-roj Doi →

eĥo el Demokrata Respubliko Kongo

Saluton kara!

Mi estas ĝoja amikiĝpete kontakti vin.

Mi estas Joel Muhire (kaŝnome: Joe Mo), loĝanta en Goma, DR Kongo. Mi ricevas ofte la informilon “Novaĵoj Tamtamas”.

Mi estas E-instruisto, muzikisto, korespondanto de Monato el Goma, redaktoro de la revuo Konga Stelo, prezidas la ILEI-sekcion de DR Kongo kaj verkis lernolibron de Esperanto en la Suahila lingvo, *“Kiesperanto Kwetu”*.

Mi naskiĝis en 1989. Mi havas edzinon kaj 2 gefilojn.

Mi ĝojos legi de vi.

Joel Muhire

[el la Redaktanto] *Dankon al Muhire. Ni petis lin skribi pri la vivo en Kongo.*

el studo de Giacomo Commeincini

La redaktanto petis s-ron Giacomo Commincini, kiu vizitis nian rondon en majo kaj junio. Li restas en Japanio kelkajn monatojn por studo. Pri tio mi petis lin verki. Ni espereble havos denovan ŝancon revidi lin, ĉar li ankoraŭ restos kelkajn monatojn.

Politika Situacio en la Sudo de Japanio — pri mia studo en Japanio —

Giacomo Commincini

La esploro kiun mi nuntempe prilaboras en Japanio temas pri la politika historio de la lando en la moderna epoko. Post la Dua Mondmilito, la insularo Nansei estis provizore okupita de Usono, kadre de strategio celanta kontroladon de Orienta Azio, areo kiu baldaŭ travivus la revolucion en Ĉinio kaj la militon en Koreio. La okupado inkludis kompreneble Okinavon, sed ankaŭ la Amamioj.

Tiuj insuloj estis aneksitaj en 1609 de la feŭdo Sacumo, kaj poste kulture asimilitaj kaj ekonomie dependigitaj de Kjuŝuo. La usona okupado disigis la Amamiojn disde la patrio, kaŭzante gravan ekonomian krizon kaj nutrinte timon ke en la planoj de Usono eble troviĝis la fondo de sendependa ŝtato rjukjua, kie Naze estus submetita al Naha, simile al la tempoj de la Reĝlando de Rjukjuo.

Tial baldaŭ formiĝis movado por la rekunigo de Amamioj kun Japanio. Malpli konate tamen estas la fakto ke tre gravan rolon en tiu batalo ludis la maldekstro – kaj precipe la Komunista Partio de Amamioj. Mi esploros ĝuste tiun organizon kaj la ideojn kiujn ĝiaj gvidantoj evoluigis laŭlonge de la tempo pri tio kion por ili signifis vortoj kiel “Japanio”, “sendependeco” kaj “komunismo”.

Temas do pri esplorado en la kampo de politika historio, kun multflankaj rigardoj al la kultura identeco de la insuloj Nansei kaj al la internaciaj rilatoj en la postmilita epoko.

sezonvorto julia

Angilo うなぎ

Okita Kazumi

Ĝi estas fiŝo, nutraĵo, kiun oni manĝas jam de la Nara-epoko (710~794).

La kutimo manĝi ĝin en la “*Doyoo*-tago*” de somero komenciĝis en la Edo-epoko (1603~1868).

Onidire angilo estas efika por senapetiteco en somero, resaniĝo post laceco, kaj por malfruigo de maljuniĝo.

Lastatempe, la kutimo manĝi angilon ankaŭ en aliaj (ne-someraj) *Doyoo*-tagoj iom post iom disvastiĝas.

*“*Doyoo*-tago” estas periodo ĉirkaŭ la ŝanĝo de sezonoj laŭ la japana tradicia kalendaro.



rostita angilo kun speciala saŭco